

MEZEŬROPA FERVOJ-MINIATURA KLUBO

FERCLUB, la Mezeŭropa Klubo de Fervojminiaturistoj - estas senprofitcela asocio, kiu klopodas diskonigi la fervojan etmodel-ismon, speciale koncerne la Fervojojn italajn, eŭropuniajn kaj, ĉiukaze, de la najbaraj ŝtatoj. Fondita en 1988, membras en ĝi ĉirkaŭ kvindeko da asocioj el ĉiuj aĝoj kaj la nova sidejo, en *Via dei Giardini 16*, estis inaŭgurita la 15^{an} de marto 2003.

En Triesto, ĝi ludas, kune kun la Fervoja Muzeo kaj tramo de *Opicina*, gravan rolon en la fervoja kampo por la interesiĝantoj al tiu temo kaj, dum la tuta jaro, ĝi estas vizitata de unuopuloj kaj de italaj kaj eksterlandaj asocioj.

En la nova sidejo, salono estas destinita por ampleksa maketo pri la Retiaj Fervojoj



(en skalo H0m), taksita aŭtentika artaĵo de la plej gravaj fakrevuoj: apud ĝi, du aliaj maketoj *Marklin* (en skalo H0) - unu, laŭ la stilo specifa de la 1970aj jaroj kaj la alia, ĉevanda.

En alia ĉambro, granda reproduktaĵo, titolita “Sen landlimoj” (skalo H0), okupas surfacon de 20 kvadrataj metroj: ĝi funkcias ciferece kaj estas ekipita per specialaj, avangardaj efektoj. En la sama ejo, “Dimanĉaj trajnetoj” (skalo H0), je dispo de la

junaj gastoj, kiuj mem povas funkciigi la diversajn vagonarojn.

Tria salono estis inaŭgurita en 2007: en ĝi trovas lokon nova maketo, en skalo “N” (1:160), kiu okupas surfacon de 15 kvadrataj metroj.

FERCLUB krome posedas simulilon, por stiri lokomotivojn, movatajn de vapore, dizelmotoro aŭ elektro. Plie ĝi havas riĉenhavajn bibliotekon, videotekon kaj hemerotekon, ĉiujn kompreneble je la sama temo: fervojoj, ĉu realaj ĉu etmodelaj. Kunlabore kun la Triesta Komunumo, la klubo aktivas en disvastiga kaj didaktika kampoj, donante al publiko la eblon konsulti librojn kaj materialon plej diversan. Oni organizas ankaŭ, interkonsente, gvidatajn vizitojn en la muzeo, por grupoj kaj lernejoj



klasoj, kaj kursojn pri fervoj-etmodelismo.

Por projektado kaj funkciado de la fervojaj maketoj pere de komputilo, la klubo metas je dispo la bazan informadika programaron.

Ĉiun unuan dimanĉon de la monato, ekde oktobro al majo, matene oni organizas senpagan programon, por ĉiuaĝa publiko, specife por geknaboj, okaze de kiu eblas mem konduki la miniaturajn “Dimanĉajn trajnetojn”.

